

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO



N° 197 JULIO 1998

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO.

*** *Sanĉita PIO X-a, preĝu por ni.* ***

MONTPELLIER

01 - 08
aŭgusto
1998



83-a Universala Kongreso
de Esperanto

Sommaire/Enhavo

	Pages/Paĝoj
Le mot du président - <i>La bileto de la prezidanto</i>	3
Prière - <i>Preĝo</i>	5
Lettre de Taizé 1998 <i>Letero de Taizé 1998</i>	6
Dans notre association - <i>En nia asocio</i>	13
Congrès oecuménique - <i>Ekumena kongreso</i>	14
Boîtes aux lettres - <i>Leterkesto</i>	15
Calendrier - <i>Kalendaro</i>	16
Annonces - <i>Anoncoj</i>	18
Abonnements - <i>Kotiztabelo</i>	19

ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO

Expéditeur/: Ass.Cath.Française pour l'espéranto
Sendinto 9,Rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR

Motif de non distribution

- Adresse insuffisante
- N'habite pas à l'adresse
- Refusé
- Autres

Périodique Semi-routé

PORT PAYE

COLMAR (68)

WALTER Road
72, Av. de Gaulle
68000 WINTZENHEIM

Surkovrile

Ĉi-tie okazis la ekumena diservo de la 2-a de aŭgusto 1998 okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Montpellier.

La preĝejo de la Sanktaj Franciskoj estas moderna preĝejo por la estonteco.

La Sanktaj Patronoj estas Francisko el Asizi kaj Francisko de Salles. Konstruita en 1997 de arkitektoj Genet-Galligani kaj Van Der Heyden.

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto. Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 15.a de oktobro kaj decembro. Venonta bulteno aperos fine de oktobro 98.

Finpresado la 08/08/1998

FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Nro 197 Julio 1998

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Espéranto A.C.F.E.)

CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:

S-ro A. BESSIERE
28, Rue C. St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:

Fano A.M. CHANEY
56, Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto:

S-ro G. VILLENEUVE
14, Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto:

P-ro L. BOURDON
7, Av. Salomon
59300 LILLE

Peranto IKUE:

S-ro M. COLLEU
95, Rue Victor Hugo
80440 BOVES

Redakcio:

Fani. BASSO-RESCIO
9, Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM

Fakse 0389794333

Reto 100623,3022@Compuserve.com

Le Mot du Président

Dans quelques jours beaucoup d'entre nous se retrouveront à Nantes pour prendre part au 13ème congrès oecuménique qui, n'en doutons pas, sera un succès et nous donnera l'occasion de passer une agréable semaine en compagnie de nos amis protestants.

La langue commune que nous parlons rendra cette rencontre encore plus fructueuse, puisque la communication sera aisée entre nous. D'autre part les espérantistes ont toujours su vivre en parfaite harmonie, lorsqu'ils se retrouvent ensemble. La messe dominicale aura lieu dans la paroisse St Donatien et nous permettra alors de mieux nous intégrer à la communauté catholique nantaise. Il en sera de même pour le culte protestant qui nous accueillera au Temple.

L'excursion nous conduira à Carnac et à Ste Anne d'Auray, donc aux sources celtique et catholique de cette Bretagne si attachante dans sa fidélité à son identité culturelle et religieuse et le dynamisme dont elle n'a cessé de faire preuve au cours de son histoire.

Ensuite ce sera le Congrès Universel d'Espéranto à Montpellier, dans une ville, qui dès le Moyen Age avait su attirer autour de sa Faculté de Médecine, renommée dans toute l'Europe, des gens venus de tout le bassin méditerranéen. Cette fois-ci beaucoup de congressistes viendront d'encore plus loin, d'au delà des mers, puisqu'il est déjà assuré que les cinq continents, symbolisés par les cinq branches de l'étoile verte des espérantistes, seront effectivement représentés au congrès.

La Bileto de la prezidanto

Post kelkaj tagoj, multaj el ni troviĝos en Nantes por partopreni en la 13-a ekumena kongreso, kiu, sensube, estos sukcesa kaj donos al ni la eblecon pasigi agrablan semajnon kune kun niaj protestantaj amikoj.

La komuna lingvo, kiun ni interparolos, igos tiun renkontiĝon ankoraŭ pli frutodona, ĉar la interparolado de unu al la alia estos reciproke facila. Aliflanke la esperantistoj ĉiam scias vivi en perfekta harmonio, kiam ili troviĝas. La dimanĉa meso okazos en la paroĥo S-ta Donaciano kaj ebligos, ke ni integriĝu la katolikan komunumon en Nantes. Same okazos en la protestanta diservo, kiun ni partoprenos en la protestanta preĝejo.


La ekskurso kondukos nin en Carnac kaj S-ta Anna en Auray, do al la keltaj kaj katolikaj fontoj de tiu Bretonujo tiom alloga en la fideleco al ĝiaj kultura kaj religia identecoj kaj la dinamismo, kiun ĝi ĉiam montris dum ĝia tuta historio.

Poste venos la Universala Kongreso de Esperanto en Montpellier. Ĝi estas urbo, kiu, ekde mezepoko allogis, en la proksimeco de ĝia fama Medicina Fakultato en tuta Europo, homojn el la tuta mediteranea regiono. Ĉifoje multaj kongresanoj venos el pli malproksima malproksimeco, el transmaraj landoj, ĉar estas jam certa, ke la kvin kontinentoj, simboligitaj per la kvin pintoj de la verda stelo esperantista estos efektive reprezentataj en la kongreso.

Gardu al mi infanan koron
Puran kaj klaran kiel fonto
Havigu al mi simplan koron
Kiu ne gustumas malĝojn,
Koron belege sindoneman,
Dolĉe kompatindeman,
Koron fidelan kaj ofereman
Kiu forgesus neniun bonaĵon
Kaj ne venĝemus pri iu ajn malbono
Faru al mi dolĉan kaj humilan koron,
Amantan sen peti resendon,
Koron altan kaj ne-dreseblan
Kiun nenia sendankeco fermigas,
Kiun nenia senameco tedas.




Skribita de Patro de Grandmaison (Politeknika Lernejo)
eltirita el libro "Noces de Diamant avec l'atome"
tradukita de E. Jacob.



Laŭdata estu, Sinjoro,
De nia fratino luno kaj de niaj
fratinoj steloj, kiujn Vi kreis
en ĉielo helaj, kaj valoraj kaj belaj.

Preĝo de Sankta Francisko el Asizi.
(sendis D. Didier)



Ne esperita ĝojo

1 Kiam duboj kaj malkvietoj sukcesas ŝanceligi en ni la kredfidon, kelkaj sin demandas: ĉu ni ankoraŭ kredas? Estas bone tiam memori, ke povas temi pri sendaŭraj momentoj de nekredemo, nenio pli.

2 Jam antaŭ Kristo, la Sankta Skribo invitadis al esperiro: "Ne plu memoru la estintajn okazojn, la pasintaĵojn, jen mi tuj faros novaĵojn, jam ĝi aperas, ĉu vi ne rekonas ĝin?" (Es 43,18-19)

3 Vidu Kor 12,9

4 Es 53,2

Tradukoj aperis en 59 lingvoj. Tiun-ĉi leteron skribis Frato Roger por la 20a eŭropa junulara renkontiĝo de Vieno (Austrio) (29.12.97 - 02.01.98)

Ĝi estos temo por meditado dum la renkontiĝo kaj dum la tuta jaro 1998 por la gejunuloj kiuj pilgrimos al TAIZE.


Feliĉaj tiuj, kiuj aspiras al tempo de fido kaj simpleco! Ili ne volas esti majstroj de la maltrankvilo sed servistoj de la fido. Ili malkovras, ke, en niaj vivoj, la klarego konstruiĝas dank'al

tutsimpla fido¹.

Ili scias tion; en la Evangelio troviĝas tiel bela espero, ke ili bonvolus ĝin travivi. Ne temas pri tiu espero, kiu estas nur antaŭenĵeto de pasemaj deziroj sed tiu, kiu naskas kreivan elanon ĝis ene de situacioj ŝajne seneliraj. Ĝi reinventas la mondon.²

Sed kie estas ties fonto? Ĝi troviĝas en la kompatema rigardo, kiun Dio direktas al ni.

Dio donas sencon al nia vivo ankaŭ tra tio, kio en ni estas vundebla,³ "nek brila nek bela".⁴ Li ekigas brileton niakore. Ĝi eble estas malforta, tute malforta sed jam ĝi lumigas niajn mallumojn.



5 Vidu Joh 14,16 "La Spirita Sankta malĉeestas neniu" (Sankta Maksimo, la Konfesanto, 7a jarcento). Dio donas la Spiriton Sanktan al ĉiu, senescepte, sed lasas al ĉiu la liberon lin rifuzi. Samkiel Kristo surtere ĉeestis apud la siaj, li daŭre dank'al la Spirito Sankta, sammaniere hodiaŭ ĉeestas por ni, kie ajn ni estas. Kaj kiam ni mortos, la Spirito Sankta ne disiĝas de la animo, kiu trafas eternan vivon. Li apudas nin por ĉiam.

6 Vidu Joh 3,8

7 Lasi la Spiriton Sanktan preĝi en ni kaj viviĝi nian atenton, tio karakterizas la kristanan preĝon. Vidu Rm 8,26-27

8 Eĉ la plej eta el nia loĝejo povas iĝi loko de akcepto kaj aŭskulto. La angulo de ĉambro aranĝeblas, por tie kelkmomente enmemiĝi. Invitante ĉetablen, memoru, ke la festspirito ne postulas havaĵabundon.

9 Vidu Mat 25,40

10 Komunio kun Dio igas komunion kun la homo en ties luktoj kaj aspiroj. Multnombraj tiuj, kiuj trovas dumpreĝe la kuraĝon preni sur si respondecojn por la aliaj. Iuj montras solidaron kun junaj homoj aŭ malpli junaj, kiuj staras senlaboraj ... aliaj

Sendube ekzistas momentoj, dum kiuj la fido stompigas, tamen ni bonvolus vivi el la promeso de Kristo kaj memori al ni, ke lia Spirito Sankta ĉiam staras en ĉiu; Li estas apogo kaj konsoligo. **5** Kiu estas tiu Sankta Spirito? Li estas la Spirito de Kristo reviviĝa.

Samkiel pri la vento, ni aŭdas ties voĉon, sed ni scias nek de kie li venas nek kien li iras.⁶ Li estas la spiro de Dio, daŭre proponita, daŭre ĉeestanta. Ĉu vi ŝprucigos enan preĝon, kiun Li estigos en Vi?⁷

Akceptante eĉ la plej humilan, ĉu vi vivos Kriston pro la aliaj?⁸ Fronte al la ne komprenebla homa sufero, ĉiufoje, kiam ni mildigas la afliktojn de senkulpulo, Kristo mem vizitas vin.⁹

Serĉi por esti kreanto de solidaroj kaj disdono liberigas en vi vivajn fortojn. Ili venas rekte el la Krista koro. Ju pli vi ĉerpas el la preĝo kreajn energiojn, des pli vi malkovras kapablon por konstrui kun la aliaj.¹⁰

19 Kie ajn ni vivas, en Taizé aù aliloke, ni tiom bonvolus, ke nia konumo diafane restadu kaj ke nia vivo per si mem parolu. Nia vokiĝo alkondukas ĉiun el ni elekti la evangelian ĝojon, la korsimplon, la kompaton, kiu estas nur pardono. Unu el niaj fratoj iutage skribis por si mem: "La ĝojo ĉiam ĉeestas, ĝi estas la ĝojo de l'Kristalvoko, miraklo, dankesprimo".

20 Mk 8,29

21 Vidu Joh 3,17

22 Vidu Jer 31,3 kaj Rm 8,38. Ni rajtas preĝi: "Vi, kiu nin amas, viaj pardono kaj ĉeesto naskas en ni la laŭdklarecon". En tiu preĝo, direbla aù kantebla, per pluraj, aù ankaŭ redirebla en la korsilento, la "Vi" sin turnas samtempe al Dio, al Kristo kaj al Sankta Spirito.

23 Vidu Ps 139,1-2

24 Vidu Rm 8,26

25 Vidu Lk 2",46

26 Eĉ se ni malmulte spertas en la Evangelio, per nur kelkaj vortoj, eblas dumtage, ke ni estu interne konstruataj. Tro ofte ni aliras la Sanktan Biblion samkiel ni legus leteron de iu amata sed kiu skribas en nekonata lingvo. Tion, kio restas nealirebla en la Evangelio, lasu. Pli poste aliuloj helpas nin por kompreni.

Antaŭ ĉio nur dank'al la atesto de nia agvivo ni povas kredebligi tiun amkomunion en la Spirito Sankta. **19**

Kaj se hazarde Kristo alparolus nin: "Kiu mi estas por vi? **20**

Ĉu ni respondus: Vi, Kriste, vi venis surteren ne por kondamni la mondon, sed por ke ĉiu homo trovu iron malfermitan al via kompatio. **21**

Vi estas tiu, kiu amas nin ĝis en la vivo, kiu neniam finiĝas. **22**

Vi kapablas senti ĉion por mi, mian deziron kompreni kaj esti komprenita, ami kaj esti amata. **23**

Vi malfermas antaŭ mi la riskovojon. La enmia ne-ado, vi iom post iom jesigas poreterne. Vi, Kristo, mistera ĉeesto, vi estas tiu, kiu, tage kaj nokte, preĝas en mi, kaj mi ne scias kiel. **24** Tial daŭre forlasante mian spiriton viamane, mi ne maltrankviliĝas pri mia preĝo tiel ofte mallerta. **25**

Vi, senlace serĉadis min. Vi sugestis al mi: Vivu kion vi komprenis el la Evangelio. **26**

27 Mk 10,21. Por vojiri kun Kristo, Dio sin turnas al ĉiu tra fidelalvoko. Ni ne miru, se ni renkontas en ni rezistojn. Sed tia fideleco povas returnalporti tiom da ĝojo, tiom da klaro, tiom da lumo. Ĝi supozas daŭran konvertiĝon kaj postulas maturiĝtempon. Ĝi ebligas la disvolviĝon de tuta interna vivo.

28 Vidu Pet 1,18

29 La ortodoksa teologo Olivier Clement skribas: "Iuj sin demandas, kiel eblas feliĉi tiam, kiam okazebblas tiaj malfacilaĵoj homavive. Ni gardas en ni grandan ĝojon, sed ĝi ne povas senkompatigi nin al sufero de aliaj. Kontraŭe ĝi nin pli kompatigas kaj ni samtempe kapablos konservi en ni tiun grandan ĝojon de l'Releviĝinta Kristo kaj eniri la korpremegon kaj suferon de l'proksimulo. Ĝojo ne kontraŭas kompatemon, ĝi nutras ĝin. Necesas travivi malĝojon kaj samtempe konservi en si ĝojon, ĉar ni scias, ke finfine la Releviĝon lastvorte parolos. Se ni ne estas la ĝojkredantoj, tiam la homaro entristen dronos. Necesas luktadi kaj tio eblas, ĉar ni konservas en ni la ĝojon: ja tiu ĝojo donas luktadforton" (En Taizé, iu vivsenco" Bayard-eldonejo 1997).

30 Vidu Sir 30,21-23

31 Elekti la laŭdspiriton supozas sagacon por ne permesi, ke impresoj distruu nin interne. Okazas babiladoj kun ni mem, kiuj neniuloken kondukas. Packoro kelkfoje supozas internan barakton: resti atenta je regado de siaj memaj pensoj, por ke neniuj ajn emocio kaj neniuj ajn impresoj invadu nin kaj por ke la fantazio ne rajtu deliri.

Venu kaj postiru min. **27**
Sed kial mi hezitis tiel longatempe? ... Tamen, mi ne vidis vin kaj amis vin.

28

Kaj iutage, mi agnoskis tion: vi alvokadis mian decidon senreturnan. Tial mi bonvolus esti travidebla kun vi, nenion kaŝi al vi el mia koro, al vi doni ne temperon de mia vivo sed mian tutan vivon.

Neniam Evangelio direktas pesimistan rigardon al la homo. Neniam ĝi invitas al malgajemo. Tute kontraŭe. Ĝi vekas pacan ĝojon. Kaj kiam ĉeestas sufero, la koro povas rompiĝi sed ne malmidiĝi. **29**

Jam jarcentoj antaŭ Kristo, kredanto malkovris tion: "Korĝojo, jen la homa vivo" **30**

Voko al interna ĝojo metas nin antaŭ fundamenta elekto: ĉu ni scios ĉiutempe decidi vivon laŭ laŭdspirito? **31**


Ĝojegu nia koro! La simpla belo de l'komuna preĝo estas loko, kie renoviĝas interna ĝojo, kiu estas laŭdspirito. Surtere ĉu la kantata preĝo ne estas kiel

32 Tiom necesas, ke la komuna preĝo estiĝu pli kontemplena dank'al ikonoj diskrete lumigitaj, kiuj estos kiel fenestroj malfermitaj al ladia eterno, kun meditataj kantoj, kiuj ebligas ĉies partoprenon. Kerne de la komuna preĝo silentotempo memorigas, ke, ofte dia voĉo aŭdiĝas en silentobloveto, samkiel malkovris la profeto Elio (vidu Reĝoj 19.12-13). Silente stari antaŭ Dio kun la deziro akcepti ties Spiriton Sanktan estas jam preĝi.

33 Lk 10,21-22 kaj Hb 5,7

34 Se mi sole preĝas, ĉu la plej bone ne estas simple esprimi tion, kio elkoriĝas kaj elnimemiĝas? La laŭdsprito ne povas altruditi. La unuaj vortoj ŝprucantaj kelkfoje estas: "Dio, venu por helpi min!" aŭ "Ne forlasu min!".

35 Sankta Aŭgusteno skribas tiun tekston kvarjarcentoj post Kristo en sia komentario pri l'psalmo 125a.



nia reviviĝo? **32**

La Evangelio diras al ni, ke dum sia surtera vivo, Kristo preĝis laŭ la laŭdsprito, sed ankaŭ kun larmoj kaj petegoj. **33**

En ni povas subite estiĝi rezistoj, maldiafanaĵoj, momentoj, dum kiuj niaj preĝdezirantaj lipoj restas neklareble malfermitaj. **34**

Sed "ankaŭ estas voĉo de l'koro kaj lingvo de l'koro... Tiu interna voĉo estas nia preĝo, kiam niaj lipoj estas fermitaj kaj nia animo malfermita antaŭ Dio. Ni silentas kaj nia koro parolas; ne al la homaj oreloj sed al Dio. Estu certa: Dio kapablas nin aŭdi" **35**

Spirito Sankta, estas en la Evangelio tiel bela espero, kiun ni deziras travivi niakore. Kiel troviĝas la fonto? Ĝi estas en la kompatema rigardo, kiun Dio direktas al ĉiu el ni.

(Tradukita de Pastro Degrelle.)

VENU, SANKTA SPIRITO

11 Ami Dmi Ami E
Ve - nu, San - kta Spi - ri - to,

21 Ami Dmi Ami E
ve - nu, San - kta Spi - ri - to.

EN NIA ASOCIO

Novaj membroj:

05/ S-ino LEVAL (Ain)

06/ S-ro MORIN (Haute-Pyrénées)

07/S-ino CLERC (Saone et Loire)

Bonvenon al la genovuloj.

Donacis mono:

S-roj Despiney, Samain kaj Scicluna

Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

La 28-an de marto 1998, la prezidanto S-ro Bessière kaj la redaktoro renkontiĝis en Wintzenheim, por prepari la diservajn libretojn de Nantes kaj Montpellier. Ĉi-sube foto kun la ĝemelaj help-redaktoroj!!



13-A EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO
DE LA 25-A DE JULIO ĝis LA 1-A DE AUGUSTO 1998.

80 personoj el 13 landoj kunvenis en LEs Naudères, en Nantes, Francio, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1998 por la 13-a Ekumena Esperanto-Kongreso, sub la temo : Toleremo, repaciĝo, libereco : 1598-1998.

Dimanĉe matene, ni partoprenis en du dulingvaj Diservoj en la urbo kun lokaj paroĥoj, unu rom-katolika, kaj la reformita. Posttagmeze, ni havis la okazon viziti la tre bonan ekspozicion pri la Edikto de Nantes.

En la daŭro de la kongreso, ni laboris per prelegoj kaj diskutoj pri : la Edikto de Nantes, pri la 2-a Eŭropa Ekumena Kunveno de Graz, la partopreno de esperantistoj en ĝi kaj pri ĝia grava fina mesaĝo, pri la lastatempa komuna deklaro pri pravigo inter la luteranoj kaj la katolikoj. Ni krome ricevis informojn el Albanio, Sudafriko, Kroatio, Francio, kaj ankaŭ pri la invitanta urbo por venontjare, nome Gliwice en Pollando.

Dum la ekskurso, ni havis la okazon viziti la urbon de S.Louis-Marie Grignon de Montfort, St-Laurent sur Sèvre, kie venis ankaŭ la papo antaŭ kelkaj jaroj, kaj ankaŭ ni vizitis la francan okcidentan protestantan muzeon en apuda vilaĝo.

Nia kongreso, kiel kutime estis ankaŭ preĝanta kongreso. Krom la ĉiutaga meso kaj la dimanĉmatenaj Diservoj, estis matenaj preĝoj, vesperaj preĝoj, laŭ diversaj formoj, kaj gregoriana meza horo.

Dul tiu kongreso, ni povis ekzerci nian kant-voĉon, kaj ankaŭ nian korpon.

Entute, kongreso plena kiun ni devis kun bedaŭro forlasi, ĉar la tempo pasis. Ĝis venontjare.

(rapide raportis Philippe Cousson per ret-paĝo)

La protokolo de la generala asembleo de nia asocio aperos en la venonta bulteno de oktobro.

LETERKESTO

El Litovio !

Estimataj homoj, saluton al vi de Litovio ! Kvankam nur naturo belas, nia vivo estas ne tre ĝoja. Pro tio mi petas vian helpon. Mi trovis reklamon, ke vi povus alsendi senpage libretojn por infanoj kaj biblion por infanoj "Dio parolas al siaj infanoj". Se estas eble bonvolu donaci du al ni.

Ni akceptus ankaŭ librojn, revuetojn por infanoj (7-12 jaraĝaj)

Ni tre revas pri la UK en Montpellier, sed mankas rimedoj al ni.

Dio, helpu al Vi ! Ni restas havantan esperon.

Mi estas la instruistino :

Bernardeta JABLONSKIENE

Liepu al. 13a-16

LT-5305 PANEVEZYS

LITOVIO -LIETUVA .

Red: Du biblioj "Dio parolas al siaj infanoj" estas senditaj kun malnovaj niaj bultenoj.

ANEKDOTOJ

Pentraĵo :

-Mi ne konas tiun regionon kaj ne sukcesas scii, ĉu temas pri sunleviĝo aŭ malleviĝo .

-Krepusko

-Ha ! Kio permesas tion firme aserti ?

-Tiu pentristo estas amiko; li neniam ellitiĝas antaŭ la 11-a matene.

(G. Zarca - Nice)

KALENDARO

1998

10/08 TAIZE

ĝis JUNUKARA EKUMENA TENDARO

16/08 kun komuna lernado de esperanto
(Aliĝis 40 e-istaj gejunuloj el 9 landoj
CZ-D-F-H-I-LIT-PL-RO-RUS)

04/09 ARENZANO (Genova - Italio)

ĝis 12-a Kongreso de Italaj Katolikaj

08/09 Esperantistoj

1999

30/04 LOURDES

Pilgrimo de esperantistoj.

ĝis Ni loĝos en komforta du-stela hotelo,
proksime de la groto.

04/05 (Programo kaj aliĝilo en venonta bulteno)

01/08 BERLINO (Germanio)

08/08 84a Universala Kongreso de Esperanto

GLIWICE (Pollando)

07/08 14a Ekumena kongreso samtempe al
3a Junulara Ekumena Esperanto Tendaro
(JET'99)

14/08

ANONCOJ

13/ La 30-an de aŭgusto ĉi-jare, okazos en Maceio (Stato Alagoas/ Brazilo), ekumena renkontiĝo, kies temo estos: "Dio de ĉio kaj de ĉiuj." La organizantoj de tiu evento invitas nin partopreni per mesaĝo al la homaro kaj petis al ni kontakti la ekumenajn grupojn. Tial, ni petas vian helpon por disvatigi la okazontaĵon. Ĉu vi pretas fari tion? Bonvolu sciigi tion al ni. Tio estas okazo por montri al la ekstera publiko, ke ni agas kaj ke esperanto ne estas mortinta lingvo. Se estos eble ni prezentos esperanton al la renkontiĝantoj pere de ekspozicieto. Se vi havas aliajn ideojn, bonvolu ne hontu skribi al ni.

Elkorajn salutojn .

Sincere kaj frate ,

Ari kaj Nubia

(nur reta adreso : ariknub@esperanto.nu

rete ricevita 04.08.98

Ps: Kion vi planas por la venonta AGO-TAGO ?

14/ Dum la lerneja jaro, la Esperanto Klubo de la Kolegio de Castanet (31) lernis esperanto kaj korespondis kun samaĝuloj de la lernejo "Osman Nakas" de Sarajevo.

Dum la somero dek lernantoj de Sarajevo alvenas en Castanet. La Klubo serĉas helpon por la kostoj de la vojaĝoj de Sarajevo al Francio, aŭ por daŭrigi tiun projekton.

Kontaktu : Esperanto-Kultur-Centro

1,Rue Jean Aillet

31000 TOULOUSE

Tel: 0561255577 .

15/ Korespondu per Esperanto

Ĉu vi scias, karaj legantoj, kial inter esperantistoj ekzistas tiel nomataj "eternaj komencantoj", kiuj preferas "krokodili" ol paroli esperantlingve? Ĉar ili ne korespondas. Korespondado kun eksterlandaj geamikoj ne nur plilarĝigas konojn pri vivo en diversaj landoj de la mondo, helpas ekligi bonajn amikajn rilatojn, sed ĝi estas grava helpilo en plibonigado de la lingvoscio. Ĉiu vera esperantisto ne povas esti sen korespondkontaktoj kun esperantistoj en aliaj landoj. Novaj esperantistoj ofte ne scias, kiamaniere ekligi korespondrilatojn, ĉar mankas al ili adresoj de eksterlandaj korespondemuloj.

El insulo Kubo ni ricevis pere de la landa reprezentanto de IKUE, frato José Luis Montes de Oca, kiu instruas Esperanton al 23-persona grupo de gejunuloj, adresojn de tiuj, kiuj deziras korespondi pri diversaj temoj kaj pri katolikismo.

Interesuloj skribu al:

Frato J.R Zverina, kiu zorgas pri Internacia Koresponda Adresaro Esperantista, kaj bezonas 60 adresojn de katolikaj esperantistoj, kiuj deziras korespondi.

Skribu do al: Jiri Rudolf Zverina
5. kvetna 26,
460 01 LIBEREC

ĈEHIO

(el Dio BENU).



TRA LA MONDO

Sabate, 13an de junio 1998 en la preĝejo St Emmerau, la ĉefepiskopo Jakubiny de Alba Iulia Rumanio, celebris esperantlingvan meson en la 96a Germana Katolika Tago en Majeno. Poste okazis kunveno.

Alberta Casey, kantistino en Usono, decidis fari CD (kompaktan diskon) nomitan "Estu Sur Tero Pac". Ĝi enhavas la tridek kantojn de ŝiaj du diskoj "Al vi de Mi" kaj "Dan Diego Vokas". La CD estas aĉetebla ĉe ELNA - Usono.

La libro titolita "De imitatione Christi" estas juvelo de la mezepoka kristana literaturo. Ĝi aperis en esperanto sub la nomo "Imitado de Kristo" tradukis G.F De Ruyter F.C Eldonis Flandra E-Ligo, 1997, 166 paĝoj.

Kotiztabelo 1998

I.K.U.E kun "Espero Katolika" 140 F
Peranto: S-ro M. COLLEU
95, Rue Victor Hugo 80440 BOVES
P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE.

A.C.F.E kun "Franca Katolika Esperantisto" unuopulo : 60 F
geedza paro : 80 F
infano ĝis 16-jara, pastro, religiu(in)o : 30 F
bonfaranto : 200 F

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 2eme trimestre 1998 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9, Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris
sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO